

LA PACDEFENDANTO

N-o. 55 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Julio 1956.

NIAMO VADO KAJ LANE ŬTRALULOJ

Sur mia redakcia tablo ofte troviĝas leteroj de niaj anoj, en kiuj ili akre kritikas mian sintenon kaj tiun de "MEM" al la neŭtrala Esperanto-Movado. Precipe kelkaj komunistaj anoj opinias, ke ni absolute ne darfis kunlabori kun t.n. neŭtraluloj.

Necesas jam foje klarigi ĉi aferon. La "Mondpaca Esperantista Movado" /MEM/ tute ne estas konkurenca organizo kontraŭ S.A.T. kaj aliaj internaciaj Esp-organizoj. Ĝi ankaŭ ne kolektas membrokategoriojn kaj unusole havas la taskon, utiligi la internacian lingvon praktika por propabandi pacon inter la popoloj de la mondo kaj kontribui al ĝia sekurigo. Por tiu celo ni eldonas oficialan organon de MEM, diversajn landajn revuojn kaj informilojn pere de kiuj ni raportas al nia anaro kaj donas al ĝi informojn pri la progreso de nia movado kaj direktivojn kiamaniere labori por ĝia sukceso. Nia gvidlinio estas la decidoj kaj programo de la Monda Pakkonsilantaro, kiu rezultigis el la kolektiva volo de milionoj da pacamaj homoj en la tuta mondo. Tiujn ĉi direktivojn kaj programon decidas la delegitoj de tiuj milionoj da pacon volantaj homoj dum internaciaj konferencoj kaj kongresoj. /Laste en Helsinko/.

Paralele kun tiu ĉi granda movado laboras kaj agas MEM kun ĉiuj siaj landaj Esperanto-sekcioj.

La pacon volas ĉiuj kulturaj, eĉ ankaŭ malpli kulture evoluiĝintaj popoloj, escepte de kelkaj grandriĉuloj, militinstigantoj kaj armilproduktantoj. Por povi efektive kaj efike kontraŭbatali tiujn ĉi malmultajn, sed des pli potenĉavajn kaj danĝerajn unuopulojn, necesas unuigi ĉiujn fortojn, kiuj sincere sopiras la pacon. Tial estas tute erara la opinio de kelkaj kompartianoj kaj aliaj, se ili kredas, ke pacon kapablas sekurigi la komunistoj solaj - rifuzante la kunlaboron de alipartianoj kaj neŭtraluloj. Estas klare, ke ĉiuj komunistoj nepre deziras pacon, ĉar nur paco povas sekurigi trankvilan konstruadon de socialismo. Sed aliflanke estas klare, ke solaj komunistoj sen kontribuo kaj helpo de larĝaj popolamasoj, malgraŭ ilia forto, nur tre malfacile sukcesus malebligi novajn eksplodojn de ankoraŭ pli kruelaj kaj pereigaj militoj.

Ni scias, ke en ĉiuj militoj kaj postmilitoj troviĝis homoj, kiuj semis pacon kaj batalis por la paco. Ĉiuj sopiras daŭran pacon. La diferenco nur estas en la vojo kaj metodoj por efektiviĝi ĝin. Same kiel inter la nacilingvaj pacamantoj, ankaŭ inter ni, esperantistoj ekzistas tiaj diferencaj vojoj kaj metodoj. La komunistoj, precipe la t.n. fanatikuloj, opinias necese, uzi la plej radikalajn metodojn por venki la militinstigantojn. Persone mi interkonatiĝis en germanaj koncentrejoj kun t.n. "Jehova"-anoj, kiuj kvankam la naziistoj proponis al ili liberecon, se ili akceptos batali por la "patrio", ili preferis suferi ĉiujn terurojn en la inferaj koncentrejoj. Mi alte estimis tiujn ĉi kamaradojn kvankam mi ne konsentis kun ilia starpuiĉto, ĉar laŭ mia opinio, ili estus povintaj fari multe pli sur la batalkampoj.

Estas esperantistoj, kiuj opinias, ke ili jam sufiĉe multe kontribuas por la paco, se ili instruas al homoj Esperanto, ĉar pere de esperantaj rilatoj kun aliaj popoloj pli firmiĝas la amikeco, ili reciproke interkonatiĝas, malamo de blindajpatriotoj malaperas, kaj militoj malebligatas. Estas homoj en la popoldemokrataj ŝtatoj, kiuj kredas, ke per intensiva konstruado kaj produktiva laboro la socialismo en iliaj landoj tiom firmiĝos, ke la kapitalistoj ne kuraĝos militakiri iliajn patriotojn.

Estas homoj, kiuj kredas, ke ju pli piaj ili estos, des pli ilia Dio helpos al ili vivi en paco kaj savos ilin antaŭ la kruelaj militoj.

El kio konsekvencas militoj?

La respondo estas klara: el disigiteco de la homaro, kiu estas arte dividita je diversaj nacioj, religioj, partioj, pli riĉaj kaj malpli riĉaj, mizere kaj lukse vivantaj homoj ktp. Tiujn ĉi fundamentajn

radikojn necesas forigi! Kaj por povi aranĝi tion, ni devas unuigi ĉiujn fortojn en la batalo por la paco!

Vidu nian organon, "La Pacdefendanton", ĝin distribuas jam ek de januaro 1956 katolika pastro, kanoniko de Sankta Venceslao Kapitulo en Mikulov, k-do Alfred MACEK. Kaj kvankam mi mem estas komunisto, mi tre estimas ĉi kamaradon kaj taksas lian kunlaboron altvalore. Kvankam en niaj vicoj estas sufiĉe da komunistoj, tamen kiam ni perdis la eblecon distribui "L.P." pere de la uzina klubo "Tatra" en Kopřivnice, neniuj troviĝis inter ili, kiu estus preninta sur sin tiun ĉi gravan taskon. Ili eble timis pro ĝia ne tuta legaleco veni en konflikton kun la partiestraro, sed katolika pastro kuraĝis batali apud komunisto. Por prava afero li riskis sian pozicion kaj ekziston kaj donis pluan viveblecon al nia organo.

Ankaŭ tiu ĉi pastro iam estis „neŭtralulo“ kaj batalis por paco laŭ sia propra vojo kaj metodo. Sed jam li konvinkiĝis, ke nur en la forto kaj unueco eblas savi la homaron kontraŭ pluaj murdoj.

Ĉu ni tiajn homojn rifuzu nur pro tio, ke ili ne estas konvinkitaj marksistoj aŭ komunistoj? Ĉu ne la Sovjet-Unia Kompartio mem etendas siajn manojn por kunlaboro al ĉiuj pacamaj homoj sen diference al kiu patrio, religio aŭ nacio ili apartenas?

Kaj tiuj ĉi sinceraj tendencoj depost la malkaŝita diktatoremeo kaj persona kulto de Stalin ankoraŭ pli firmiĝas.

El tio rezultas, ke ankaŭ ni, esperantistaj pacdefendantoj en nia pacmovado kaj batalo por la paco iras la ĝustan vojon, nefarante diferencon inter ni kaj la neŭtralaj esperantistoj. Ni ĉiam devas serĉi vojon, kiu nin en tiu ĉi heroa batalo unuigas kaj rifuzi tiun, kiu povus konduki al divido.

Ne ĉiuj havas same evoluitan spiritan staton kaj sekve ankaŭ ne ĉiuj ideoj estas unuecaj. La devo de tiuj, kiuj sin sentas esti pli konsciaj kaj kleraj post pruvitaj spertoj, estas: pacience instrui kaj konvinki la aliajn, kiuj ankoraŭ troviĝas sur erara aŭ ne tute ĝusta vojo kaj ofte siajn fortojn vane kaj sensukcese eldonadas. Tion kompreneble oni ne povas fari per insultado aŭ atakoj reciproka, sed unusole pere de amika diskutado, praktika kaj ekzemplodona agado.

Sed necesas diri ankaŭ kelkajn vortojn al la neŭtraluloj. Ankaŭ inter tiuj troviĝas multaj, kiuj sincere sopiras daŭran pacon kaj opinias, ke laŭ ilia vojo ili plej efike kaj sufiĉe kontribuas al ties venko. Ja mi kredas, ke ja plimulto da esperantistoj estas konvinkita, ke Esperanto mem nur povas efektive sukcesplene evoluigi dum paca tempo. Tio estas ĝusta, sed malpravaj estas tiuj, kiuj opinias ke la paco venos mem kaj ne necesas por ĝi organizi batalon. Kaj ankoraŭ pli eraras tiuj, kiuj kredas (plejparte sub influo de reakciuloj), ke la pacmovado estas maskita movado de komunistoj, ĉar tiuj ĝis nun plej aktive en ĝi laboras. La venko de la paco kaj samtempe ankaŭ la venko de Esperanto dependas kaj rezultas nur al nia forto kaj unueco.

Ni do ne riproĉu al niaj gek-doĵ se ili membras ĉe UEA, SAT aŭ alia organizo, sed klopodu ilin ĉiujn unuigi en la komuna intereso kaj envicigi ilin al kunlaboro por la mondopaco!

Rud. BURDA

AL ĈIUJ KOMITATANOJ DE LA TUTŜTATA KONSULTA KOMITATO ESPERANTISTA /TKKE/!

Surbaze de persona traktado de la membroj de TKKE, s-ano M. Rudolf kaj pliposte d-ro Jaromir Jermář kaj Josef Vitek, la Centra Komitato de la Ĉeĥoslov. Komunista Partio komisiis la Ministerion por kulturo, ke ĝi en kunlaboro kun la TKKE rapidigite preparu ĉion necesan por krei tutŝtatan organizon de esperantitoj en Ĉeĥoslovakio. Direktante sin laŭ la inspiroj de la CK de CKP kaj direktivoj de la ministerio por kulturo, ni faris jenajn necesajn aranĝojn:

1. statutojn por Ĉeĥoslovaka Esperanto-Unio ellaboris - dro. Tom. PUMPR. Konsilanta traktado: d-ro. Jaromir JERMÁŘ, d-ro. Stan. KAMARÝT, prof. Josef KOŽENÝ, Jaroslav MAŘIK, Pavel ROSA-Miloš RUDOLF, Jar. ŠUSTR, Eduard V. TVAROŽEK, Josef VITEK kaj Josef VONDROUŠEK.
2. aliĝis envicigon en la planon por 1957, eldonadon de presita organo de Ĉeĥoslovaka Esperanto

Unio (paralele en Slovakio).

3. peti la ŝtatan eldonejon envicigi en la planon por 1957:

a) presi lernolibron (de Kilián),

b) presi ambaŭpartan vortaron (de Filip, disvastigita II. eldono),

4. peti la Esperanto-rondeton de Hospodářský Podnik en Olomouc, ke ĝi aranĝu Tutŝtatan Konferencon de Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio en oktobro 1956. Post tiu ĉi konferenco, surbaze de la laŭstatuta traktado, post la balotoj ktp komencos la tutŝtata organizo sian vivon. Ĝis tiu tempo la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista estas de la ministerio por kulturo rajtigita, funkcii kiel preparkomitato. La konstitucian konferon partoprenos reprezentantoj de la C.K. de Ĉ.K.P., de ministerio por kulturo kaj aliaj.

5. La esperantistoj en Olomouc volante akceti aranĝi la Tutŝtatan Konferencon kaj proponas, por ĝi jenajn datajn: 14a, 21a aŭ 28a de oktobro 1956.

6. Por la estos kunvokita konsilado de TKKE-aktivuloj al Doksy (50% fervojrabato), kie estos pritraktataj ĉiuj gravaj aferoj, kiuj preventivas la tutŝtatan konferencon. Por tiu ĉi konsilado vi ricevos ĝustatempe invitilon kaj rabatbileton.

Nepro ni petas:

ĉar okazis, ke rilate la printempe projektita konferenco en Bratislava estis publikigita vico da sin kontraŭaj aŭ nefaktaj raportoj, estu publikigitaj nur neŝanĝeblaj publikigindaj sciigoj de TKKE kiel raportoj de la Preparkomitato de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Unio.

Por la TKKE:

Josef ViTEK
prezidanto

Miloš RUDOLF
sekretario

La Ĉeĥoslovakaj esp-pacdefendantoj, kiuj ankaŭ havas siajn reprezentantojn en la TKKE, certe kun ĝojo akceptas la supre cititan informon kaj kiel ĝisnuna avangardo de la Esperanto-movado, ili ankaŭ en la estonto estos la plej aktivaj laborantoj en la kreota Ĉeĥoslovaka Esperanto Unio. La amasa partopreno de niaj anoj en la oktobra konferenco de Olomouc alportu al ni la lastan kaj plej gravan venkon de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio!

La konferece nepre devas pruvi al la ĉeestontaj reprezentantoj de la partio kaj ministerioj, ke Esperanto estas unu el la plej efikaj armiloj en la tutmonda lukto por sekurigi al la homaro la pacon kaj la esperantistoj ĝiaj plej aktivaj propagandistoj kaj defendantoj!

Rud. BURDA
prezidanto de MEM

"JUNAJ HERBOJ" REE APERIS

Tiu ĉi vere interesa gazeto de japanaj esp-pacdefendantoj, kiun eldonas "MIJA ESPERANTO SOCIETO" en AITI-KEN jam ŝajnis esti mortinta. Al ĝiaj pasintjaraj abonantoj en ĈSR ni anstataŭis ĝin per liverado de la bulgara "BULTENO". Subite atingis nian redakcion nova sendaĵo de tiu ĉi interesa revuo. Alvenis el 1955 la n-roj 33-34 kaj 35-36 k. por la nuna jaro la n-oj kaj 37-38 kaj 39-40. En la espero, ke ni de nun regule povos ĝin liveri al niaj abonantoj ni tuj sendis al ili tiujn ĉi numerojn. Novajn abonantojn ni provizore ne povas akcepti.

La Red. -

PRI LA SITUACIO EN LA GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

La 27/5. 1956 kunvenis en Meissen aktivaj gek-doj el diversaj partoj de DDR por interkonatiĝi post pasintaj 20 jaroj da stagnado, dum kiu multaj batalantoj pereis kaj novaj naskiĝis. Ili reciproke informiĝis pri la progresoj kaj sukcesoj atingitaj en diversaj lokoj de la lando post akra batalo por nia afero.

La renkontiĝon ĉeestis 54. gek-doj inter ili 43 viroj kaj 11 virinoj. Ili reprezentis esp-istojn el 22 urboj. Laŭ okupo estis 17 laboristoj, 13 oficistoj, 11 instruistoj kaj ceteraj sen profesio. Ilia aĝo

moviĝis inter 16 -71 jaroj.

El la konferencdiskutoj resumas:

Post la debaklo de la Hitler-regado kaj dekjara stagnado refondis la esp-istoj siajn grupojn, estis aranĝitaj kursoj kaj la taggazetoj ree raportadis pri Esperanto. Laŭ dekreto de Germ. Administracio por Internaj Aferoj de 12. 1. 1949 ĉiuj societoj kaj unuiĝoj estis envicigitaj en amasorsanizojn escepte la Esp-grupoj, ĉar al tiuj oni kontestis kulturalan valoron. De tiu tempo la ĵurnaloj ĉesis publikigi raportojn pri Esperanto.

De la 7. 10. 1949 validas la konstitucio de DDR, kies artikolo 144. diras: ĉiuj decidoj de tiu ĉi konstitucio estas rekte valoranta juro. Kontraŭaj dekretoj ne valoras.

Ĝia 12. artikolo diras: ĉiuj civitanoj estas rajtigitaj fondi unuiĝojn kaj societojn, kun celoj, ne kontraŭantaj la leĝojn.

La artikolo 9. diras: ĉiuj civitanoj rajtas diri libere kaj publike siajn opiniojn en la limo de la leĝoj kaj tiucele kunigi paceme, k. nearmite. Tiu libereco ne estas ĝenata per deĵor- aŭ labordungado. Neniu estos malhelpata uzante tiun rajton. Pres-cenzuroj ne ekzistas.

Laŭ tio la esp-istoj konstatis, ke malpermeso de iliaj organizoj estas kontraŭ la konstitucio kaj sur tiu ĉi bazo ili komencis batalon kontraŭ la ministerioj, kiuj persiste konservas ĉi malpravajn ordonojn. Komence de 1955 ofic. instancoj konfesis, ke Esperanto ne estas malpermesita, ke neniu estas malhelpata paroli aŭ skribi pere tiu ĉi lingvo. Sed unuiĝoj restas malpermesitaj. La aserto pri kultura senvaloro de Esperanto k. kosmopolitismo estas refutata de esp-istoj pruvata la malo. Tiam la Centra Komitato de "SED" (Socialista Unuecpartio) aprobis, ke la esp-istoj povas labori en la kadro de la pacmovado, kie estas ankaŭ ebleco eklerni Esperanton. Memstaraj Esp-grupoj ne estas permesataj kaj kunvenoj en publikaj ejoj devas esti same kiel antaŭe anoncitaj ĉe sekurecoficejoj.

Niaj klopooj instruadi Esp-on en lernejoj, fari varbkampanjojn, eldoni lernolibrojn kaj gazeton ne sukcesas, ĉar la subaj oficejoj daŭre atendas direktivojn de la superaj.

Malgraŭ la grandaj sukcesoj en la Popoldemokratioj kaj Sovjet-Unio, La DDR-oficejoj restas pasivaj rilate al Esperanto. Spite tio ni vigle laboras, kvankam neorganizite kaj firme esperas, ke ankaŭ ni baldaŭ sukcesos rompi la barojn.

Kurt KESSLER
DRESDEN-KLOTZSCHE

PRI LA BALOTOJ EN NEDERLANDO

Dum la balotoj la 13.6. por parlamento en Nederlando, la komunista partio perdis du mandatojn. Estis malfacila afero por komunistoj fari propagandon. Dum aliaj partioj pere de radiostacioj regule insultis kaj atakis la komunistojn, tiuj mem ne ricevis permeson defendi sin. Tiel aspektas la "laŭdata okcidenta demokratio". La dekstraj socialistoj kaj katolikoj profitis plejmulte dum tiuj ĉi balotoj.

A. v. d. GRAAF.
SLIEDRECHT-Nederlando

KORESPONDEMULOJ ATENTU!

Post anonco en "L.P." mi jam ricevis 34 il.p.k. kaj leterojn. Mi tre dankas kaj ankaŭ nia Esperanto sekcio, ĉar mi ja mem ne sufiĉas al ĉiuj respondi, aliaj membroj al mi helpas ...

Jb.v.LEEUWEN-WESTZAAN

... similajn sciigojn ricevas nia redakcio el ĉiuj landoj. Evidentiĝas, ke anoncoj en nia organo alportas ĉiam certan sukceson. Sekve ankaŭ vi ne forgesu anonci en ĝi!

RADIODISAŬDIGOJ EN ESPERANTO

Ĉiujn informojn koncerne Radio sendu al s-ano. G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS-16, Francio.
mallongigoj: Informoj = I, paroladoj = P, kursoj = K.

DIMANĈO:

15. 00-15.15 Piracununga, 198m, K. Rádiodifusora ZYL . 3. Piracununga, Sao Paulo, Brazilio.

LUNDO:

00.00-00.10 Bilbao, 265m, P.K. Radio-Bilbao, Hispanio

15.50-14.00 la Coruna, 250m, P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanio.

23.40-23.57 Hilversum, 298m, 188m, P. NCRV, Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando. /nur ĉiun unuan lundon/

MARDO:

01.45-02.00 San Jose, 192m, F. Radio Welcome CW 47 A , San José, Urugvajo.

18.35-13.40 Bern, 48.66m, 31.46 m,

13,94m, P., d-ro Baur, SRG, Kurztwellen-dienst, Neugasse 23, Bern, Svisio.

16.00-16.10 Ljubljana, 327m, K, Radio Ljubljana, Jugoslavio.

20.00-20.15 Stockholm, 20.10m, P. Radio--I. B. R. A. Stockholm-I, Svedio.

(nur lastan mardon de ĉiu monato)

20.15-20.30 Carlet, 288m, I. Radio Carlet, Valencia, Hispanio.

Merkredo:

16,30-16,40 Wien, 203m, 48m, 41m, 30m, 25m, P.

17.00-17.10 Caramulo, 205m, I, Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalio.

18.55-19.10 Roma, 41.24m, 50.90m, 25.46m, I. P. s-ano. Minnaja, Radio-Roma, Cas. post, 320, Roma, Italio.

22.55-25.05 Wien, 208m, 48.74m, 25.46m, I. Radio-Wien, Argentinierstr. 30a Wien-IV, Aŭstrio

23.15-23.20 Hilversum, 298m, 402m, I.V.A.R.A. Heuvellaan 53, Hilversum, Nederlando,

ĴAŬDO:

7.45-7.50 Perpignan, 202m, K. Radio-Perpignan, Roussillon (Pyr. Or.) Francio.

9.50-9.15 Paris, 348m, 249m, K. Esperanto Office, Orléans (Loiret) Francio

12.55-15.00 Bern, Kiel marde, P. d-ro Privat.

18.55-18.40 Bern, same kiel marde.

23.50-24.06 Valencia, 200m, I. K. Radio Alerta, Colon 11, Valencia, Hispanio.

25.45-24.00 Zagreb, 264m, T. Radio 2, Zagreb, Jugoslavio.

VENDREDO:

00.30-1.00 São Paulo, 62.83m, I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilio,

1.45-2.00 San José, Kiel marde .

18.55-19.10 Roma, Kiel merkrede, P. d-ro Musella.

20.15-20.30 Carlet, kiel marde.

22.30-22.45. Guatemala Od. 470m, 197m 47m, 50. 50m, I. Radio Esperanto, I a Voz de Guatemala, Gvatemalo, Meza Ameriko.

SABATO

12.15-12.30 Rio 1e Janeiro, 214m, K. Radio Rouete Pinto PRD. 5, Rio de Janeiro D. P. /Brazilio.

18.30-19.00 Rio de Janeiro , 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m, K.I. Radio Ministerio da Educacao, Rio de Janeiro /D. F. / Brazilio.

19.45-20.00 Barcelona - 560m, I. K. Radio Union, Emisora del Frente de Inventudes, Barcelona, Hispanio.

23.15-23.22 Hilversum, 298m, 188m, P.K.R.O. Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Ni rekomendas sendi raportojn k. salutleterojn al la cititaj Radio-stacioj. Vi tiel kontribuas al plivastigo de Esp-disaŭdigoj.

NE LA ANGLA SED LA RUSA

(Korektigo al la Molotov-telegramo)

En la aprila-maja n-o. de "L.P." ni raportis, ke laŭ "HEROLDO" japanaj oficistoj opiniis la anglan lingvon Esperanto. Sed fakte laŭ "Heroldo" estis ne la angla, sed la rusa, kiun Japanoj opiniis Esperanto.

La telegramo estis en rusa lingvo per latinaj literoj anstataŭ kirilaj kaj tio kaŭzis la miskomprenon. Sekve de tiu eraro ankaŭ nia konkludo troviĝas je erara bazo.

BONVOLU KOREKTIGI

En la aprila-maja n-o. de "L. P." ni erare skribis sur titolpaĝo, ke referencis por nia petskribo por ricevi prespermeson por nia organo, k-do. Prof. Teodors ARBERGS, pedagogo en Riga-Latvio. Bonvolu korektigi: La nomita k-do ne estas profesoro, sed tramisto en Riga.

NI VOKAS LA REDAKCIOJN

de "JUNAJ HERBOJ" kaj de japana virina gaz. "ĈERIZO". De J.H. mankas al ni n-oj: 30, 31, 32. "ĈERIZO" jam dum monatoj ne atingis nin. Bonvolu kontentigi iel niajn abonantojn!!!

LA UNUA HIRUNDO POR LA JUNULARA FESTIVALO EN MOSKVO

Sekve de la alvoko de Leningrada ensemblo, kiun ni eldonis an formo de ĉeĥlingva flugfolio, jam aliĝis 73membra kolektivo de slovakaj kantistoj kaj dancistoj por partopreni la festivalon. Jen ilia letero, sendita al la Kulturdomo de Industri-produktivaj Kooperativoj en Leningrado 14 . de junio 1956:

"Ricevinte vian alvokon en ĉeĥa lingvo, koncerne Esperanton kaj la Festivalon de Junularo en Moskvo 1957, la membroj de nia muzikista, kantista kaj dancista ensemblo, kiu nombras 76 anojn, tre volonte partoprenus la festivalon en 1957 en Moskvo kun esperanta programo de slovakaj kantoj kaj dancoj. Niaj anoj tre volonte lernus Esperanton se al nia kolektivo kreiĝus honora okazo partopreni la Festivalon.

Ni ĉi tie faros ĉion eblan, por povi kun vi renkontiĝi. Ni kredas, ke nia ensemblo estas la unua el la eksterlandaj, kiu aliĝas ĉe vi kun la ebleco esperantlingve prezenti slovakajn kantojn kaj dancojn. Bonvolu, karaj gek-doj, respondi al ni ĉu nia propono estas efektivebla kaj ĉu vi, pere de via Esperanto-sekcio povus al ni helpi kaj proponi nian partoprenon al la Festival-komitato. Ĉu vi ne povus al ni sendi invitilon de la Festival-komitato? Ĝi multe validus al ni ĉe niaj landaj instancoj.

Nia ensamblo, kiu jam ekzistas 1 kaj ½ jaron tre intensive laboras. Dum tiu ĉi mallonga tempo ĝi jam aranĝis 35 tutvesperajn publikajn prezentadojn.

Ni proponas al vi nian kunlaboron kaj aranĝon de reciprokaj vizitoj por 1957.

Atendante vian respondon, ni salutas vin kamarade kaj amike.

Ensemblo por kantoj k. dancoj

" H O N T "

de Kulturdomo en Dvorniky

HONTIANSKÉ TESARE, Krupina.

D-ro Imrich Havaš, gvid. de ensamblo .

Ĉar el Ĉeĥoslovakio nur malmultaj elektitaj gejunuloj havos la eblecon veturi al Moskvo, dependos nun ĉefe de niaj leningradaj gek-doj, ĉu ili sukcesos instigi la Festival-komitaton, ke tiu la slovakana ensamblon oficiale invitu al la Festivalo-1957.

ĈEĤOSLOVAKA-POLA RENKONTIĜO

Okaze de Esperanto-seminario en urbo Třinec kunvenis pli ol gek-doj ol div. lokoj de nia lando dum interkonatiĝa vespero en la klubejo de uzino "MoIotov". La vesperon ankaŭ ĉeestis 16 gek-doj el Polio. Por ili salutparolis k-do inĝ. Zdislaw Glajcar, la unua MEM-peranto por Polio. Por la ĉeĥaj gek-doj parolis d-ro Mohapl, profesoro Kožený, Slaný, Rudolf kaj Lička la ĉeĥosl. MEM-peranto.

Dinanĉe matene ĉiuj per omnibuso veturis al la Monto Ĉantorio, kiu ĉe la vilaĝo Nýdek formas la limon inter ĈSR kaj Polio. Malgraŭ akra nordvento alvenis ankoraŭ 50 gek-doj el Polio. Ili venis el Cieszyn, Biala, Stalinogrod k. a. lokoj. En amika kunesto oni kantis esperantajn, polajn kal ĉeĥajn kantojn kaj parolis pri la progresoj de nia movado en ambaŭ landoj.

Frant. LIĈKA

NI SALUTAS LA BULGARAN KONGRESON

La 1-3. de julio okazigos en Sofio la 32a Bulgara Esperanto - Kongreso. Post longjara stagno rekunvenas la bulg. esp-istoj sub la devizo "Per Esperanto por la Mondpaco", por reciproke interkonatiĝi kaj post akiritaj spertoj plani sian laboron por la venonta epoko. Post la mallonga tempo de ilia revigligo, la bulg. gek-doj vere povas esti fieraj je la rezultoj de ilia laboro. Ilia oficiala organo "BULTENO" trafe respeguligas la pozitivan laboron de niaj bulg. gek-doj. Ni povas konstati, ke per la ĝis nun atingitaj sukcesoj, ili jam multe superis la ĉeĥoslovakajn Esperantomovadon.

Malgraŭ tio, ni ilin ne envidas, ĉar iliaj sukcesoj ja samtempe estas niaj. Ni deziras al la 32a-Kongreso de niaj bulgaraj gek-doj en la nomo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj tro grandajn sukcesojn kaj esperas, ke iliaj decidoj plue efike kontribuos al la granda Esperantista Mondpaca Movado.

La red.

IOM EL LA ARMENA LITERATURO

Ni prezentas al vi ĉi tie tri rakontojn el la verko de eminenta armena poeto kaj verkisto Avetik ISAHAKJAN. El armena originalo ilin tradukis en ĉeĥan lingvon k-dino Ludmila MOTALOVÁ por la monata revuo por literaturo kaj arto "KVĚTEN" kaj por niaj legantoj ilin esperantigis d-ro Josef ČERNÝ el Plzeň:

ENAMIĜINTOJ

Du enamiĝintoj paŝis trans ponto, sub kiu kun bruo ruliĝis ondoj de rivero.

- Mi vin amas, -- li diris. - Mi pruvos al vi per kio vi nur volos. Ordonu, ke mi saltu de ĉi tiu ponto, kaj mi saltos -

Ŝi respondis:

- Ho, tion mi neniam volos de vi: mi timas. -

- Kion?

- Mi tiinas, ke vi ĝin vere farus.

Pasis du jaroj. Tiuj du transiris ree trans la sama ponto.

Li diris al ŝi:

- Ĉu vi memoras ankoraŭ, ke ke ni iris antaŭ du jaroj trans ĉi tiun ponton? Ĉu vi rememoras, pri kio ni parolis?

- Mi rememoras, ŝi respondis. - Sed nek hodiaŭ mi volos ĝin de vi: mi timas.

- Kion? --

-- Mi timas, ke vi ĝin ne farus --

INFANAĜO

Estis foje belega kastelo, alte, altege, sur agloflugiloj.

Tage nokte zumis tie en alton starantaj aceroj kaj betuloj. Sur illa silka foliaro brilis roso el senĉese ŝprucantaj fontanoj. Ebriigaodoro de rubenaj rozoj kaj aliaj edenaj floroj tie disverŝiĝis kiel maro, trapenetris marmor-murojn kaj en nektaro malseketigis de la suno bruligitajn montojn kaj valojn. Nokte la lunradioj teksis el arĝentaj fadenoj travideblajn teksaĵojn kaj ĉirkaŭŝpinis per ili la mirbelan kastelon.

De mateno ĝis mateno, de vespero ĝis vespero soneĥiĝis de tie la ne ĉesanta gaja ridado, sur

oraj ondoj de kortuŝaj kantoj naĝis revaj fantomoj kun bluaj veloj.

Unutage la kastela pordego malfermiĝis, kaj junulo en armilaro elrajdis sur viglega ĉevalo. Kaj la ferrigliloj malantaŭ li bruferme enfalis.

La fraŭlo per klaraj okuloj ĉirkaŭrigardis, spronstimulis la ĉevalon kaj rajdflegis trans montojn kaj valojn ĝis li troviĝis en la homa mondo. Kiel plumeto li ekripozis en ĝia ŝtormoplana sino.

Ĉie li estis kaj ĉion li vidis.

Li vivis en luksaj domoj, trinkis vinon similantan al stelŝaŭmo, metis kapon sur brustojn de belaj virinoj fermetante la okulojn sub pasiaj kisoj. Sed kiam li vekiĝadis, lia kapo kuŝadis sur malmola kapkuseno kaj en la brakoj de la belulino en arda kisado dormiĝadis jam alia.

Li vivis en mizeraj kabanaĉoj, kie malsataj gepatroj al propraj infanoj prenis for de la buŝoj panon malmolan kiel ŝtono.

Li troviĝis en batalbruegoj kie fluis homsango kiel vino kaj la homoj ebriaj de nebridebla sopiro mortigi, murdis kaj estis murdataj.

Li troviĝis en kunvenoj, kie instruituloj per siaj senpotencaj pensoj nur malklarigis la purajn akvojn de vero.

Li estis martelita en ferkatenoj por helpi tiujn, kiujn oni malĝuste traktis, li suferis en karceroj malhelaj.

Li proponis la manon al riĉuloj kaj sur lia malmola manplato fiksiĝis salivo de honto.

Li estis jam laca kaj elĉerpita.

Li apenaŭ sin tiris sur siaj malfirmaj kruroj, sed li iris kaj iris ĝis li ekstaris antaŭ sia belega kastelo sinapogante je pilgrimbastono.

Li ekfrapis la pordon unuan fojon, duan fojon, sed neniu al li malfermis. Li frapis kaj frapis, sed neniu malfermis al li. Pasis tagoj, jare longaj, sed neniu al li malfermis.

Tiam laca kaj senfortigita li sinkis sur ŝtonon antaŭ la pordo, la sulkoplenan frunton li premis al siaj malmolaj genuoj, la maljunecajn manojn kunplektis sur sia vivaventurema kapo. Li atendis ĝis la pordo malfermiĝis.

Kaj do la malproksimiĝintaj reroj sonatingis lin ne ĉesanta gaja ridado, survivoraj ondoj de kortuŝaj revaj fantomoj kun bluaj veloj

Li atendis kaj atendis, sed neniu al li malfermis.

La eniro en la kastelon estis el li por eterne ŝlosita.....

EN KIO ESTAS KONSOLO

Okazis, ke al vidvino mortis la unusola filo kaj postlasis la tutan familion en granda malĝojo kaj plej alta mizero.

La afliktanta patrino vestis sin en funebroveston, iris, sidiĝis sur la freŝan tombon de la filo kaj senespere, amare ploris.

De mateno ĝis vespero, de vespero ĝis malfrua nokto ŝi sidis tie, malsata kaj soifa kiel sablero sub la monto de sia malĝojo. Nur malofte ŝi levis la kapon kaj rigardis tien, de kie leviĝis mallarĝa fulmstrieto. Ĝi volviĝis, kunplektiĝis kun ŝiaj singultoj, leviĝis alten super la vilaĝon, disiĝis kaj penetris eb ĉiun kabanon.

- Kompatinda virino, - diris al si la vilaĝanoj, - kia malĝojo renkontis ŝin.

Kaj kuniĝis spertaj grandaĝuloj el la vilaĝo, iris en la tombejon al la funebranta patrino kaj diris al ŝi:

- Ĉesu jam plori, kompatina virino, per larmoj vi ne revenigos kion vi perdis. Tiel okazas jam en la mondo. Ni naskiĝas, ni devas morti. Kaj kiu sukcesas sian sanon gardi, havas kaŭzon esti fiera. Ni apartenas al la morto kaj ĝi al ni, necesas pacakordiĝi kun la volo de ia sorto. . . .

Revenu hejmen, orfaj genepoj atendas viajn manojn. Iru kaj prizorgu ilin, plenumu vian devon! La mortinto ripozu, en paco, konsolita, ke li tiel baldaŭ liberiĝis de tiu ĉi larmoplana valo ...

Tiel parolis la spertaj grandaĝuloj, kies fruntoj estis malvarmaj, de haŭtfaldoj sulkigitaj. Sed la malfeliĉa patrino ne levis la kapon kaj plue amaro, kordolore ploris ...

Do, kunvenis la riĉuloj el la vilaĝo, iris al la afliktanta patrino kaj diris al ŝi:

- Ĉesu plori, kompatinda virino. Mortinte estas mortinto, sed viva homo devas vivi; kaj viaj georfoj volas vivi! Revenu hejmen, ekhejtu en la fajrujo, kunvenigu la genepojn ĉirkaŭ vi ŝirmu ilin kaj, eduku! Venos tempo, ili anstataŭos al vi la filon.

Kaj ni estas tamen viaj plej proksimaj najbaroj, kaj ne fremdaj homoj. Ni helpos vin, subtenos Trankviliĝu kaj revenu hejmen.

Sed la bedaŭrinda patrino ne aŭdis ilin, la kapon ne levis, kaj refoje, ankoraŭ pli malespere kaj pli korŝire ploris kaj ploris.

Tiam pilgrimanto trairis la vilaĝon. Li ekaŭdis la korŝiran ploradon kaj lia koro pleniĝis pro malĝojo. Li alpaŝis la vilaĝanojn kunvenintajn ĉirkaŭ la malfeliĉa patrino, kaj demandis ilin, kie okazis.

Poste li kliniĝis al la tero, kisis al la malespera virino la manojn kaj - elkore ekploris.

Tiam la patrino, kiu perdis la filon, eklevis la kapon, kaj sekigis siajn sange ruĝigitajn okulojn. Estis, kvazaŭ la pilgriminto, estus dividinta kun ŝi la ŝargon, kiu ŝin estis teren preminta. Kaj sur ŝia nuboplena frunto ekbrilis radio de konsolo.

Ŝi leviĝis kaj paŝis kun nova espero en sia koro al sia estingiginta fajrujo.

Ĉeĥa revuo "MONDO DE SOVJETOJ" eldonos kompletan libron en ĉeĥa lingvo kun verkoj de A. Isabakjan.

NOVAJ SUKCESOJ EN POLIO.

La Pola Esp-Asocio ankaŭ eldonos "PACO"n kaj propran bultenon en presita formo. En julio eldoniĝos granda belaspekta Esp-revuo "POLLANDO". Vi povas ricevi 20-50 ekz. kaj rekompenci ilin per eksterl. Esp-literaturo. Baldaŭ RADIO WARS ZAWA disaŭdigos 2-3foje semajne. Tiukaze bonvenigu la elsendon!

NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

INFANDESEGNOJ KONTRIBUAS AL PACO

Antaŭ nelonge min petis germana instruisto k-do. Kurt WEBER, prizorgi por lia lernejo en Dreseno desegnaĵojn de ĉeĥaj infanoj rekompence por desegnaĵoj de germanaj infanoj. Ĉi peton mi prezentis al la estraro de nia meza lernejo en Ostrava-Zábřeh, kiuj tre afable min akceptis kaj promesis ĝian plenumon. De k-do Weber mi transdonis al nia lernejdirektorino, k-dino Cigánková, 32 desegnaĵojn kaj pentraĵojn de dresdenaj infanoj al kiuj mi aldonis ĉeĥajn klarigojn. Post unumonata kolektado ŝi transdonis al mi 107 desegnaĵojn kaj pentraĵojn de siaj infanoj el la 3a-8a klasoj kaj propran leteron kun diversaj proponoj kaj deziroj por k-do. Weber.

En dankletero al nia direktorino, k-do Weber sciigis, ke ĵus en la kadro de 750jara jubileo de la urbo Dresden okazis granda ekspozicio en kiu li instaligis la ricevitajn desegnaĵojn, kiuj vekis grandan intereson inter la publiko kaj infanoj. Tia maniere pli firmigis la amikeco kaj paco inter ambaŭ niaj popoloj.

Pli poste mi proponis al la direktorino instruadon de Esperanto en tiu lernejo. Ŝi tute kompleze promesis, tuj post la ferioj komenci instruadon de Esperanto. En tiu ĉi meza lernejo fondiĝos Esperanto-rondeto sub la protekto de la direktorino mem. Kiel instruisto funkcios k-do. A. Chrápavý.

Tion ĉi mi sciigas al vi, por ke ankaŭ en aliaj lokoj vi klopodu tiamaniere labori por Esperanto kaj la mondpaco. Fr. Lička-Ostrava.

KARLOVY VARY en julio fondiĝos Esperanto-rondeto ĉe la Kultura Domo en Karlovy Vary. La direktoro de la Domo jam proponis al ni, ke ni prezentu nian laborplanon por tiu ĉi duonjaro kaj samtempe la necesajn monpostulojn por kovri la elspezojn. Per tio ankaŭ en nia urbo finiĝas la

malfavora situacio por nia movado. La -15an de julio ni gastigos k-dinon G. Jon Meppen, edzinon de fiŝkaptisto el Dirkerdam (Nederlando) kaj en aŭgusto nin vizitos amiko de d-ro. J. Jermář, bulgara filozofo Vasil Ĉočov. Tiuj vizitoj certe multe kontribuos al nia loka movado.

Vlad. HORÁK

PODĚBRADY, la 3an junio okazis la unua solena laborkunveno de la Esp-rondeto ĉe Distrikta Pop. Biblioteko en Poděbrady. Ĉeestis ges-anoj el diversa lokoj. Dimanĉe kunvenis 67 partoprenantoj en la festo dekorita salono de restoracio "Bílá Růže". La kunvenon gvidis k-do Fr. Pytloun. Pri la agado de la rondeto raportis k-do Nozar kaj Chvosta. Sekvis prelego de s-ano J. Víttek pri la Esp-movado tutmonde, de prof. Kožený pri nia landa movado kaj de s-ano J. Mařík pri la agado de la junularo. La programo kompletigis per kantoj kaj muziko. Esp-lingve kantis s-anino Vaněčková akompanita de samideanino Hlediková. La laborkunveno, kiu donis al nia juna rondeto novajn impulsojn, finiĝis per komuna tagmanĝo kaj posttagmeza vizito de memorindaĵoj en Poděbrady.

Jos. CHVOSTA

PLZEŇ, ankaŭ dum la someraj tagoj kunvenadas regule ĉiu vendrede ĉ. 20 gek-doj en "Anglický Dvůr" sur placo Palackého náměstí. La kunvenoj komencas de la 1. horo, kaj daŭras ofte, ĝis la 2a. En la programo troviĝas konversacioj kaj diversaj, ĉiam interesaj prelegoj. Vigle laboras nia junularo. Ĝi prizorgas ekspozician vitrinon vida-vide de la klubejo, kiun multaj pasantoj ĉiutage kun intereso servas. Dum lasta membrokunveno ricevis 10 kursanoj okaze de kursfino, ateston, kiujn oni en solena maniero transdonis al ili samtempe kun Esperanto-insigno.

MUNICIO POR NIA BATALO

K-dino. Vybulkov-Hrad. Kral.	4. -Kĉs
K-do J. Hudec-Liberec	4. -"
K-do. P. Tichota-Stará Role	4. -"
K-do. V. Pečinka-Lázně Jeseník	8. -"
K-dino V. Králová - Litvínov	4. -"
K-do. P. Tichota-Karlovy Vary	4. -"
K-do. Vl. Sládeček-Karviná	4. -"
K-do, R. Hromada-Praha	8. -"
K-do. J. Toufar- Brno -	9. -"
K-do R. Kajš-Vítkov	3. -"
K-do J. Veselý-Kostelec n/Č.L.	4. -"
K-do L. Plavec-Hříměždice	4. -"

KORESPONDI DEZIRAS.

Trilinia anonco kostas 3,- Kĉs aŭ 2 intern. resp. kuponojn. Por pliaj linioj necesas alpagi po 1,- Kĉs aŭ po unu resp. kupono. El eksterlando ni akceptas ankaŭ esperantaĵojn anstataŭ pagon. Ĉiu anoncanto nepre almenaŭ unufoje per il. p.k.respondu al ĉiu korespondanto.

K-do . Walter NITSCHKE, Karl-Marx-str., n-o. 51, BURGSTADT/Sa, Germanio-DDR. kun gek-doj el ĉiuj landoj. Interŝanĝas fotojn, gazetojn, il.p.k, ktp.

K-do Karel SCHWARZ, Kaplířova č. 8, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, pri astronomio. Per leteroj kaj il.p.k.

K-do Vratislav KUČERA, pošt. schr. 61, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio. Kun ĉiuj landoj interŝ. alumetvignetojn, il.p.k.,pm.

K-do P.M. KIRJUŠIN, Krasnaja 16, kv20, MINSK-5, Sovjet-Unio, serioze, precipe kun scienculoj pri filozofio, logiko kaj psikologio. Interŝanas Esp.-lingvan kaj nacilingvan literaturon. Kun ĉiuj

landoj.

Gelernantoj el Vjetnamo deziras kontakti kun la tuta mondo. Temas pri komencantoj, kiuj ankoraŭ ne regas perfekte nian lingvon. Tial skribu sur via letero jenan frazon en vjetnama lingvo:

De-nghi ban trao-đoi tranh-anh, tem kui. Cám on. Dia-chi cua toi: t. estas:

"Mi proponas al vi interŝanĝadon de il.p.k. kaj p.m. Dankon – Mia adreso:

Elektu el jenaj adresoj:

K-do Phung Van Tu mit 5, ngoNha, Chung, HANOI, Vietnam (15jara)

K-do Bui-le-Guong, 12, Cho Ton – Dan, HANOI, Vietnam (16jara)

K-dino, Ng-Thi-NHÁT, 44, pho Phan Boi-Chan, HANOI, Vietnam (16jara)

K-dino Tran-Hu-Thin, 30, Mai-hac Dẻ, Hanoi, Vietnam (15jara)

K-dino Phung-Thuy-Lan, 28 Yet-Kiên, Hanoi, Vietnam

K-dino Hoang-le, 143, Hang Bac, Hanoi, Vietnam (15jara)

K-dino Bui-Kim-Chi, 61, pho Thuco bao, Hanoi, Vietnam (15jara)

K-dino Do-nhu Nguyet, 67, lẻ.v.Huu Hanoi, Vietnam (16jara)

K-dino Do-thi-Nhung, 9 Tran-cao Van, Hanoi, Vietnam (14jara)

K-dino Phan-ngoc-Anh, 43, Hang Tiec, Hanoi, Vietnam (13jara)

Por propagando skribu sur la leterkovrilo: "Hay hoc Esperanto đẻ liẻn-lac." Tio signifas: Lernu Esperanton por korespondadi!"

K-do Josef KAISER, Hradiště č. 25, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per leteroj kaj il.p.k. kun ĉiuj landoj.

GLUMARK- kaj ESPERANTAĴOJN KOLEKTANTOJ

Fondiĝis "Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo" (EKIK), kiu havas la celon peri al siaj anoj interŝanĝadon de esperantaĵoj.

Por tiu celo ĝi eldonas bultenon "La GLUMARK-KOLEKTANTO". Petu detalajn informojn ĉe: K-do J. CHAPPELLIER, 43, Rue Palissot, NANCY (Mthe et Malle) Francio

ĈU VI JAM ALIĜIS POR LA SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ EN DOKSY?

Ni akceptas abonantojn ankaŭ por duonjara abono por 8 Kčs.

VIZITU LA HUNGARAN ESPERANTO-KONFERENCON

Por la 18-20a de aŭgusto la hungaraj gek-doj projektas aranĝi tutŝtatan konferencon de esperantistj en Budapeŝto. Eksterlandaj gek-doj estas kore invitataj. Bonvolu sin turni por detalaj informoj jam nun al: K-do Pál BALKANYI, per adr. Magyar Nemzetti Bank, Fiokiroda, Budapest 54.

NE FORGESU, KE NI ĈIAM LUKTAS KUN MANKO DA MONO – TIAL EGALIGU ĜUSTATEMPE VIAN JARABONO, SE VI NE VOLAS KAŬZI AL NI MALFACILAĴOJN!

Eldonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU, odbor esperantistů – MIKULOV, Redaktis: K-do. Rudolf BURDA, Palackého náměstí č. 6, P L Z E Ň , Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O
--